

Marto 2013

SVENSKA
ESPERANTO-
TIDNINGEN

La Espero

2013: 2

LA ESPERO

Organ för Esperantorörelsen i Sverige,
utgiven av Gefle Esperantoförening.

Gefle 1913. Svenska Skolmateriel Aktiebolaget.

N:o 1

Redaktör:
R. PEHRSSON

Ansvarig utgivare:
W. WAHLUND

Febr. 1913



N:o 5.
Juni 1913.

Redaktör:
R. PEHRSSON

Ansvarig utgivare:
W. WAHLUND

Lösnummer 10 öre.
Årsprenumeration 1:20 kr.
Annonspis 5 öre pr mm.

Tri diversaj aspektoj de nia fronta paĝo

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694

2013 • 101-a jarkolekto

Fondita en 1913

Redaktion: Bengt Olof Åradsson och Olof Pettersson

Frågor om prenumeration, adressändringar o. dyl.:

Esperanto-Centro, Vikingagatan 24, 113 42

Stockholm, tel. 08-34 08 00. sveda@esperanto.se

E-post: laespero@esperanto.se

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi & Bengt O Åradsson

Tryck: Pingvinpress, Råå

Prenumeration 2013: 200 kr.

Prenumerationsavgiften för La Espero ingår

i medlemsavgiften.

Plusgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro, tel. 08-34 08 00

Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,

E-post: sveda@esperanto.se

Nätsida: www.esperanto.se

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

Plusgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 2013:

Direktansluten medlem 200 kr.

Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar

under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU,

Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.

Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av La Espero.

Tilläggssexemplar kostar 100 kr/år).

UEA-avgifter och prenumerationer: Leif Holmlund,

Kågevägen 40 B, 931 38 Skellefteå, tel: 0910-733810

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,

Postgiro: 578-5

Nätsida: www.algonet.se/~eldona

E-post: eldona@telia.com **Telefon:** 070-5850054

ESPERANTOGÅRDEN

Adress: Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors,

Nätsida: www.esperanto.se (meny Esperanto-Gården)

E-post: egarden@esperanto.se

Telefon: 0590-309 09

Manus till La Espero

sänds till Bengt Olof Åradsson

Nygatan 10A; 281 48 Hässleholm; tel 070-200 4574

e-post: laespero@esperanto.se

	<i>Stoppdatum</i>	<i>Utkommer senast</i>
Nr 1	15 januari	15 februari
Nr 2	28 februari	30 mars
Nr 3	30 april	31 maj
Nr 4	15 augusti	15 september
Nr 5-6	31 oktober	30 november

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

Saluton! En la lasta La Espero vi faris kelkajn demandojn al la legantoj. Mi respondas.

La ideo pri la gazeto en elektronika formo estas bona ideo. Por maljunuloj kaj vidhandikapuloj estas pli facile legi ekrane ol papere, se ne estas tro malgrandaj literoj. La Espero tamen estas pli facile legebla nuntempe ol antaŭe, eble pro pli bona paperkvalito aŭ pli videblaj literoj. Se oni devas elekti inter elektronika aŭ papera gazeto estas bone se oni povas provi antaŭ ol oni definitive decidas.

Ankaŭ min interesas legi malnovajn numerojn de La Espero. En la malgranda ĉambro en EC ni ja havas multajn malnovajn librojn, inter alie kolektojn de LE. Tamen malnovaj libroj ofte estas malfacile legeblaj pro la bruna aŭ flava papero kaj la malgrandaj literoj. Ni ne devas forgesi la historion kvankam oni vivas en la nuntempo kaj iom en la estonteco.

Rete ricevita informo estas bona sed ne kreu ke ĉiuj esperantistoj havas la plej modernan poŝtelefonon aŭ GPS. Mi ŝatas paperajn mapojn kiuj povas esti tre interesaj kiam oni vojaĝas en la fantasio. Surpapera informo estas ankaŭ bezonata, sed ne uzu tro malgrandajn literojn al ni maljunuloj 70+.

Tutkore salutas
Soile Lingman

La jarraporto de SEF

MEMbroj, kiuj volas ricevi la jarraporton de SEF, povos mendi ĝin ĉe Ann-Louise post la 7-a de aprilo. Eblos ricevi ĝin elektronike aŭ papere. Sendu vian nomon kaj adreson al annlouiseakerlund@gmail.com aŭ telefonu 0736-170123.

Ann-Louise Åkerlund

Redaktoraj vortoj

Per la ĉi-numeraj artikoloj montriĝas la esenco de Esperanto – la internaciecon. Vi inter aliaj trovos artikolojn kiuj rilatas al Tanzanio, Brazilio, Indonezio, Islando, Finnlando, Japanio kaj aliaj. Kompreneble la artikoloj ankaŭ temas pri komunikado per unu maniero aŭ alia.

Finfine ni povas prezenti la ĉefpreleganton de la Sveda kongreso en Karlstad. Estos Stefano Keller UEA-estrarano pri eksteraj rilatoj. Vi trovos iom pli da informo apud-paĝe.

Per la helpo de Per-Olov de la klubo en Malmö mi ricevis skanitajn paĝojn pri la unuaj numeroj de La Espero. Mi dankas pro lia serĉado kaj espereble mi povos publikigi pli da materialo el malnovaj numeroj de La Espero.

Amuzigan legadon!

Egentligen är det svenska Esperantorörelsens andra födelse som kan firas i år, den som inträffade efter Idokrisen. Det är framför allt den nu hänsovna Esperantoföreningen i Gävle som bör hedras för detta. Den tycks till stor del ha bestått av småföretagare, folk från det som då kallades "begåvningsreserven" och som sökte sig en framtid antingen inom politik och fackförbund, eller som tjänstemän eller just som småföretagare.

Deras första åtgärd var att skapa en ny svensk Esperantotidning efter den som övergått till Idorörelsen. När tidningen väl skapats tog de sig an en förnyelse av Svenska Esperanto-Förbundet. Ett stadgeförslag publicerades i april 1913 och antogs i sin helhet vid La Tutsvedaj Esperantotagoj i Gävle i juli samma år.

Styrelsen bestod av 12 personer med ett verkställande utskott på tre personer, alla tre bosatta i Gävle. Snart blev en ung ekonom, Gustav Adolf Larson (1888 – 19??), biträdande kassör i SEF och upptäckte att SEFs ekonomi var på väg mot katastrof. Tryckkostnaderna för La Espero steg kraftigt, medan SEF stadgade att medlemsavgiften skulle vara två kronor och den skulle innefatta avgiften för tidningen.

Utan namns nämnande fick Larson en uppläxning i La Espero av Paul Nylén, som menade om SEF-medlemmarna bara gjorde sin plikt och värvade nya medlemmar så skulle allt lösa sig till det bästa. Men det fanns fler än Adolf Larson som insåg problemet och de löste det tillsammans genom att bilda den ekonomiska föreningen Förlagsföreningen Esperanto, som övertog ansvaret för Svenska Esperantotidningen La Espero. "Denna överlåtelse är emellertid endast formell ..." skrev redaktören Paul Nylén förringande i La Espero.

La Espero gick under många år med förlust, men tack vare klok skötsel av Förlaget kunde detta inte bara kompensera förlusten och ekonomiskt stödja SEF, utan dessutom verka för att skaffa nya esperantister och därmed nya kunder för sina läroböcker och ordböcker. Saker och ting tycktes gå åt rätt håll. Så sent som 1941 beskrev Tiberio Morariu poetiskt Förlaget som solen och SEF som dess satellit.

Men just på fyrtioalet inleddes en mindre pragmatisk utveckling i alla UEAs medlemsorganisationer, den som sociologen och esperantohistorikern Peter G. Forster i boken *The Esperanto Movement* kallar för "The Postwar 'Prestige' Policy". För den svenska Esperantorörelsen innebar den att För-

lagets uppgift så småningom degraderades till att under SEFs ledning verka för Esperantos och rörelsens prestige. Syftet med prestigepolitiken var att få medlemstaterna i FN att officiellt acceptera Esperanto som internationellt hjälpspråk, ett slags "fina venko". Förlagets ekonomi försvagades därav till ett bottenläge år 1994, men räddades några år senare genom ett frikostigt legat.

Planen att få FNs medlemsstater att acceptera Esperanto som hjälpspråk besvarades redan 1966 av FN med ett bestämt och otvetydigt nej. Sedan kom 1968, ungdomsrevolternas år, då de flesta auktoriteter ifrågasattes, utom Marx och Mao, och Ivo Lapenna, som både ingjutit tillförsikt hos esperantisterna och fram till dess varit framgångsrik med sin strategi, valde att dra sig tillbaka 1970. Men ungdom och ungdomsrevolter är övergående tillstånd och kunde inte ligga till grund för en strategi. I sökandet efter en sådan har i stället försvar för utrotningshotade språk kommit att framstå som en möjlighet. Andra menar att berikandet av Esperantos kultur i vid mening och befordrandet av Esperantos användning utanför rörelsen är en tillräcklig och mer nödvändig uppgift.

Bertil Nilsson

Kongressprogrammet tar form!

Vi har fått en intressant huvudföreläsare till kongressen: Det är Stefano Keller från UEAs styrelse. Han ansvarar för externa relationer, eller "kommunikation med omvärlden", men framförallt intresserar han sig för språkliga rättigheter och minoritets-språks ställning, vilket är synnerligen passande för årets kongressstema. Mer information om Stefano och föredraget kommer att finnas på hemsidan (esperantosverige.se) under menyn SvEspKon där allt du behöver veta står.

Flera känner nog till Martin Strid. Han befinner sig på utlandsuppdrag under våren, men kommer – om tekniken står oss bi – att berätta om esperanto i Armenien genom en videouppkoppling över internet. På det sättet vill vi få med den tekniska aspekten av kommunikation och vilka möjligheter den ger.

Olof Pettersson kommer att göra en

lite utökad repris från Helsingborg med det föredrag han och Hakan höll där om inslag av esperanto i kursen "Människans språk" på det nya humanistiska programmet i gymnasiet. Arild Mattson kommer att hålla kurs för nyfikna besökare.

Du kan läsa allt om kongressen genom att använda direktadressen svespkon.esperantosverige.se till hemsidan. Man når även informationen genom att klicka sig fram med den övre menyn "SvEspKon". Beställ din plats på kongressen genom att kika under menyn "Butiko" där "Aliĝo al la kongreso" faller ner om man drar muspekaren dit. Särskilt erbjudande i år är att unga under 26 år kan beställa masslogi för 50 kr natten. Har du ingen dator kan du ringa Anita Dagmarsdotter på 0703-299 399.

Vi befinner oss just nu i den andra

avgiftsperioden som har 26 april som sistadatum. Detta innebär att betalningen ska vara oss tillhanda senast detta datum, annars gäller priserna för den tredje perioden även om du har bokat tidigare.

Du som funderar på att bli enskild medlem på hemsidan Esperanto-Sverige.se i och med att du beställer – bli medlem först! Det är gratis och kräver inte att du är medlem i någon organisation. Som hemsidesmedlem kan du logga in för att beställa kongressen och därefter kan du se din beställning och vad som fortsatt händer med den. Glöm inte att använda hela ditt korrekta namn med för- och efternamn, även för användarnamnet (salutnomo) när du registrerar ditt medlemskonto.

Välkommen!

Stella Lindblom och Olof Pettersson

Renaskiĝo de la anar-samea lingvo

Laŭ informoj, ricevataj de la fama lingvistino Tove Skutnabb-Kangas ĉefpreleginto de la Simpozio de UEA okazinta ĉe UN en Ĝenevo (2008)ⁱ, aperis filmeto pri renaskiĝo de la (severe endanĝerigita – laŭ Unesko) anar-samea lingvoⁱⁱ.

La video baldaŭ ricevos la esperantan subtekstadon. Ĝis tiam eblas jam legi tion ĉi tie:ⁱⁱⁱ

Aktivemuloj povus jam komenci traduki la subtekstojn en sian lingvon (tio do estas peto al

vi!) el tiu 'originalo' esperanta, kiu estis pretigita laŭ la ĝusta angla versio kontrolita de Tove Skutnabb-Kangas (la jutube aperigita angla versio de surteksto devos esti reviziita, kaj publikigita, laŭ la publikigintoj kaj TSK).

Mi promesis al Tove kaj al la aŭtorino de la filmo, ke esperantistoj disvastigos la raportfilmon pri renaskiĝo de tiu minacita lingvo, laŭeble en plej multaj lingvoj. Ankaŭ Giri faris same, li jam aperigis la informon en sia ipernito^{iv}.

Ni ja subtenas ĉies rajton uzisian gepatran lingvon. Kaj nia tutmonda reto pruvu sian kapablon!

Koran antaŭdankon por ĉia kunlaboro, ĉu traduka, ĉu disvastiga (blogoj, listoj, ktp).

Bonvolu kontakti min rekte pri via traduka kunlaborpropono.

Stefano Keller

Estrarano de UEA pri eksteraj rilatoj
Ĉefrepresentanto de UEA ĉe
Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo

ⁱ www.lingvaj-rajtoj.org/eo/programo.html

ⁱⁱ www.youtube.com/watch?v=e0YclkUoEhc

ⁱⁱⁱ www.lingvaj-rajtoj.org/stefano-keller/Reborn-Renaskigho-de-la-anar-samea-lingvo-tra-familia-historio-esperanto-versio-tradukis-Stefano-Keller.pdf

^{iv} www.ipernity.com/blog/giridhar/399984

Lernu! bezonas helpon – tradukistoj de ĉiuj lingvoj

Kiel vi eble jam scias, lernu.net baldaŭ lanĉos novan version de la retejo: kun multaj novaj materialoj kaj nova kurso. Pro tio nun kiel neniam antaŭe lernu! bezonas helpon de esperantistoj, kiuj pretas esti volontulaj tradukisto ĉe lernu!: el preskaŭ tricent tradukistoj, nur ĉirkaŭ trideko fakte estas aktivaj. Estas facile esti parto de nia teamo: simple vizitu la retpaĝon http://lernu.net/pri_lernu/kunlaborantoj/tradukantoj.php. Ni bezonas tradukistojn de ĉiuj lingvoj; ni nepre ne volas ke lingvoj malaperu en la transiro al la nova lernu!, sed se ni ne havos sufiĉe da tradukantoj por via lingvo, via lingvo povus malaperi de lernu!.

Se vi volas pli da informoj, kontaktu teamo@lernu.net. Detala gramatiko de Esperanto nun estas tradukata nacilingven, kaj baldaŭ estos tradukeblaj tekstoj por la nova kurso. Kunlaboru kun ni por pretigi la novan lernu! por lanĉo!

Erinja Piateski
teamo@lernu.net

Att grunna på

I förra numret av La Espero skriver kongresskommittén: "För alla utrotningshotade språk finns ingen välkänd gruppering som Amnesty International eller WWF" och de fortsätter: "Är det männe en uppgift för esperantovärlden? Det kan du grunna på tills i maj."

Frågan hänger naturligtvis samman med vad som brukar kallas språkliga rättigheter och esperantovärldens inställning till dessa är inte okomplicerad. Den handlar egentligen mer om att formulera skyldigheter. Även om Zamenhof kanske inte direkt

talade om skyldighet, så betraktade han det som ytterst önskvärt att alla lärde sig ett gemensamt språk. Och han kunde inte inse, påstod han, att det vore en nackdel om alla kunde bara ett språk.

Den inställningen var alltför radikal och modifierades snart. Ivo Lapenna lanserade på sin tid en trespråksdoktrin – alla borde, beroende på omständigheterna, lära sig två eller tre språk. UEA har gått vidare på samma linje och presenterar på sidan: www.lingvaj-rajtoj.org som sin nuvarande ståndpunkt att varje

människa bör, beroende på omständigheterna, lära sig två, tre eller fyra språk. Var ska det sluta?

Ett annat dokument, som undviker att tala om hur många språk man måste lära sig, presenteras på adressen www.linguistic-declaration.org och finns även i tryckt form på esperanto till försäljning hos UEA. Och förhoppningsvis i framtiden också på ett eller flera språk hos EsperantoSverige.se.

Bertil Nilsson

La islandaj sagaoj en novaj svedaj tradukoj

Post ĉi-jare ĉiuj islandaj sagaoj estos publikigitaj en novaj svedaj tradukoj. La eldonistoj Kristinn Johannesson, Karl G. Johannesson kaj Gunnar D. Hansson kondukas grandan projekton, kie dudeko da tradukistoj tradukis la sagaojn en la svedan. En tiu tradukprojekto mi havis la respondecon por dek sagaetoj, inter tiuj *Þórhalls þáttur knapps*, kiun mi nun ankaŭ tradukis en esperanton: La rakonto de Torhallur Knappur. Parto de ĝi estas prezentata ĉi-tie apude, sed la kompleta sagaeto estos publikigita en la nova retpaĝo de la islanda revuo La Tradukisto post ĉi-somere.

La islandaj sagaoj konsistigas gravan parton de la literatura historio de la mondo. Tamen povas esti malfacile trovi iajn sagaojn en librovendejoj kaj bibliotekoj. Ĉiokaze nun oni nur devas atendi kelkajn monatojn por povi legi ĉiujn la sagaojn en nova sveda eldono, kaj kelkajn semajnojn por povi legi la tutan rakonton de Torhallur Knappur en la reto.

Joakim Lilljegen

La rakonto de Þórhallur Knappur

Viro nomiĝis Þórhallur kaj estis nomata Knappur. Li vivis en Knappstaðir en Fljót. Þórhallur devenis de potenca familio kaj liaj gepatroj estis loĝintaj en la bieno antaŭ li. Þórhallur estis justulo, kvankam li estis pagana kiel la plimulto en la regiono en tiu tempo. Li havis lepron kaj suferis multe de ĝi. Þórhallur oferis al idoloj, kiel lia familio kutimis fari. Ne malproksime de la bieno de Þórhallur estis granda pagana templo, kiun la homoj en Fljót posedis kune kaj kutimis uzi por ĉiujaraj oferceremonioj.

Unu nokton kiam Þórhallur dormis en sia lito, li sonĝis ke li estis eksterdome. Li vidis brilan viron veni rajdante al la bieno sur blanka ĉevalo. Li estis majeste vestita kaj portis oran lancon en sia mano. Kiam Þórhallur vidis la viron alproksimiĝi, li ektimis kaj volis kuri en la domon.

Sed la rajdanto estis pli rapida. Li desaltis de la ĉevala dorso, stariĝis antaŭ la pordo kaj diris: "Ne timu, ĉar ne trafos vin io malbona per mia alveno. Kontraŭe mia ĉeesto donos al vi sanon kaj feliĉon, se vi volas sekvi miajn konsilojn. Mi ne bezonas demandi ĉu vi malĝojas pro via malsano, ĉar mi scias ke vi malĝojas pro ĝi. Nun venu kun mi, kaj mi montros al vi sekuran manieron

esti liberigita de via malsano."

La vizitanto kondukis lin ien ekster la ĝardenbarilo kiu ekzistis ĉirkaŭ la bieno, kaj diris al li: "En ĉi tiu loko vi lasu konstrui domon dediĉita al la ununura kaj vera Dio, laŭ la maniero kiun mi montros al vi. Ĉi tiu Dio estos predikata al vi nun post ĉi-jare en la kunveno de la Alþingi, ĉar vi rajdos certe al la kunveno ĉi tiun someron. Se vi poste kun pura koro adoras la Dion kiun ili predikos al vi tie, vi estos sana, kaj kun sana korpo vi trankvile ĝojos en ĉi tiu mondo. Kaj en la venonta mondo vi ĝuos eternan gloron kaj feliĉon."

... Dum tiu tempo loĝis virino kiu nomiĝis Þórhildur en la najbarbieno proksime. Ŝi estis forta virino kaj tre lerta pri magio.

La saman nokton kiam Þórhallur havis la menciitan sonĝon, Þórhildur vekis siajn homojn jam je la tagiĝo kaj diris: "Vi devas kiel eble plej rapide foriri por kolekti ĉiujn niajn brutojn de la paŝtejoj kaj veni hejmen kun ili, bovoj, ŝafoj kaj ĉevaloj. Poste fermu ilin en la stalojn kaj ĉirkaŭfermejojn, ĉar tiu kiu eliras sub la libera ĉielo ĉi tie hodiaŭ ne restos viva. Mia najbaro Þórhallur en Knappstaðir tute perdis la saĝon kaj sendis siajn homojn por malkonstrui la

sanktan templon tie. Tiam la grandaj dioj, kiujn oni adoris tie, estos devigataj fuĝi en kolero kaj serĉi protekton kaj hejmon tiel for norde kiel Siglunes. Mi ne volas ke miaj bestoj estus en la vojo kie ili iros, ĉar ili estos tiel koleraĵaj kaj furiozaĵaj ke ili malverŝajne ŝparos la vivon de iu kiu baros al ili la vojon.

Oni faris kiel ŝi diris, kaj ĉiuj ŝiaj brutoj estis movitaj hejmen kaj enfermitaj, krom unu pakĉevalo kiu restis en la kampoj. Tiun oni poste trovis morta.

Sed por Þórhallur en Knappstaðir okazis ĉio, kio estis rakontita al li en la revelacio. Li iĝis laŭtage pli sana kaj liaj povoj kreskis. En la somero li rajdis al la kunveno de la Alþingi, kaj tie li renkontis tiujn, kiuj predikis la kristanan evangelion, pri kio baldaŭ estos rakontita [aliloke en Flateyjarbók, sed ne en ĉi tiu teksto / noto de la tradukisto]. Þórhallur transiris al la vera fido, kaj tuj kiam li estis baptita, lia korpo estiĝis plene restarigita. Poste li iris feliĉe hejmen al sia bieno, kaj dum la resto de sia vivo li adoris la ĉiopovan dion en la preĝejo, kiun li dediĉis al li, la unua kirko konstruita en Fljót en la nomo de la patro, de la filo kaj de la sankta spirito, la triunuo, kiu estu honorita kaj glorita tuteterne.

Amen.

Monda Tago de Akvo

En tiu ĉi monato venos la monda tago de la akvo, je la 22a. Anticipe mi jam verkas pri la temo kaj ankaŭ mi kolektas opiniojn pri tiu gravega temo. Certe pri tio, ĉiuj homoj fervore pripensadas kaj agadas kaj eĉ oni sentas la devon sin manifesti, por la defendo de la akvo kaj cele la daŭrigon de la vivo en nia kolektiva domo, la planedo tero.

Oni komprenas la gravajn defiojn kaj certe estas tio ke nepre necesas kompreno kaj klopodo en tiu kampo, por protekti la naturmedion, ĉefe pri la akvo de nia mondo. Pro tio kara, mi petas vin bonvolu aperigi tiun artikolon kie ajn vi povas, ĉu rete, ĉu papere, por ke ĝi estu diskonigota plej multe, mi petas ankaŭ al vi.

Do bonvolu sendi al mi viajn

komentariojn, mi petas, kaj via diskonigo pri tiu nuna paĝo, ambaŭ aferoj tre gravas por mia nuna verkado. Pro tio mi kore dankas al vi.

<http://www.paivanetto.com.br/index.php/esp/artigo?cm=94049&cs=100>

Paulo César
www.bonavolo.com

Sumoo

Hej alla ni, som liksom jag inte tog er tid att läsa en bok på esperanto då och då.

Mer eller mindre av en slump kom jag med i s-ro Horis läsecirkel. Man läser få eller flera sidor efter eget val i en bok man själv väljer under 14 dagar fem gånger per år. Man skickar per e-mail uppgift till s-ro Hori att man läst det man "lovat". Man behöver inte läsa en hel bok. Det är en lite speciell känsla att läsa något på esperanto på samma gång som ett eller ett par hundratal andra i världen läser något på esperanto.

En gång såg jag att några i Nepal läst "Mio mia filo". Häftigt eller hur! Har man läst varje dag under 14-dagarsperioden, så kan man få ett tjustigt diplom.

LÄS för att det är roligt att läsa esperanto – och du lär dig alltid något nytt.

LÄS för att stödja s-ro HORIs arbete.

LÄS för att "använda" esperantoböckerna.

ANMÄL dig till horizonto@water.sannet.ne.jp

Kerstin Rohdin

Radio 1

Indas rapport, ke Pola Retradio len Esperanto nun havas novan retejan adreson jenan: <http://www.pola-retradio.org>

Redaktorino Barbara Pietrzak ricevis efikan teknikan helpon el Bruce en Kanado kaj el Salikh el Japanio. Koran gratulon al la samideanoj Bruce Crisp kaj Salikh Zakirov. Nia Zamenhofa lingvo ne konas limojn en la mondo.

Amike salutas
Jorma Ahomäki
ĉe Piispanristi en Finnlando

Sukcese finiĝis la 201:a Internacia Esperanto-Sumoo

Sukcese finiĝis la 201a Internacia Esperanto-Sumoo.

Sumoo estas japana tradicia lukto-arto. Ĝi okazas dum 15 tagoj, 6-foje jare. Paralele kun tiu konkurso ni organizas Esperanto-sumoo-n. En ĝi partoprenantoj promesas, ke ili legos iun libron kaj iun kvanton da paĝoj por unu tago. Kiam ili plenumas tiun promeson, ili akiras unu venkon. Tiamaniere ili legadas ĉiun tagon dum la 15 tagoj.

La 201a Esperanto-sumoo okazis inter la 13a kaj 27a de januaro 2013, kaj en ĝi partoprenis 120 homoj el la tuta mondo krom el Afriko: nome Japanio: 49, Francio: 15, Vjetnamio: 13, Pollando: 11, Koreio: 6, Danio: 4, Italio, Finnlando, Usono: 3, Germanio, Svedio: 2, Tajvano, Brazilo, Serbio, Ĉinio,

Barato, Kanado, Argentino, Ĉeĥio, Portugalio: po 1

Dum la 15 tagoj la sumo de legitaj paĝoj estis 8800.

Esperanto-sumoo multe kontribuas al plialtigo de Esperantokapablo de la partoprenantoj kaj al Esperanto-libro-kulturo.

La venonta sumoo okazos ekde la 17a ĝis la 31a de marto. Mi atendas vian partoprenon.

Detalojn vi vidu en la suba retejo, en kiu vi trovos la historion, rezultojn, kaj kiujn librojn ni legis:

<http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/index.html>

HORI Jasuo (s-ro)

371-0825 Japanio, Gunma, Maebasi, Ootone 2-13-3

horizonto@water.sannet.ne.jp

Tago de la radio

Saluton! Okaze de la tago de la radio (la 13a de februaro 2013) ni petas vin dissendi informojn pri la retradio-kanalo Muzaiko al via landa asocio kaj al kiuj vi ŝatus – ĉiu varbado estas bonvena. :)

Vi povas legi pri Muzaiko: muzaiko.info/pri-muzaiko/legu – aŭ jen ekzempla dissendinda retmesaĝo:

Aŭskultu ĉiutage Muzaikon! La retradio-kanalo Muzaiko ludas por vi 24 horojn en tago muzikon, programerojn, novaĵojn, informojn, raportojn, arkivaĵojn kaj multe pli - kaj ĉio en Esperanto!

Pro la bunta elsendo Muzaiko

taŭgas por fervoraj esperantistoj samkiel por komencantoj – kaj por aŭskulti, kaj por kunkrei.

Do, aŭskultu ĉe muzaiko.info kaj por kontribui skribu al info ĉe muzaiko.info.

Vi kaj via asocio estas ankaŭ tre bonvena kontribui al Muzaiko, kaj tiel disvastigi vian agadon en la Esperanta mondo. Se vi havas demandon, bonvolu skribi al info ĉe muzaiko.info.

Amike kaj antaŭdankante vian helpon kaj reagon

Veronika

kaj la teamo de Muzaiko

Radio 2

Jen ege bona retejo por ĉiuj, ĝenerallernantoj same kiel spertaj esperantistoj. Aŭskultu en klara (kaj malrapida) esperanto kaj sam-

tempe legu interesajn artikolojn pri diversaj temoj.

<http://aldone.de/retradio>

Mi forte rekomendas ĝin.

Ann-Louise

Ett nytt steg på vägen ...

SEF har fått en ansökan om stöd till ett projekt i Bunda, Tanzania. Sökande är *Mazingira Community Development Forum* genom dess ordförande Mramba Simba Nyamkinda. Projektet går ut på att köpa in



Ĉe la enirejo de la mezlernejo

solpaneler och tillhörande utrustning till organisationens radiostation som är belägen i byn Salama Kati, i ett område som ännu inte har tillgång till elektrisk ström. Stationen sänder redan under 6-8 timmar per dygn med hjälp av solpaneler och en gammal bensingenerator. De nya panelerna skulle göra det möjligt att sända dygnet runt till de mer än 400.000 invånarna i distriktet.

Den ideella organisationen *Mazingira*, som registrerades 2008, arbetar med ett stort antal projekt till vilka de fått stöd av bland annat europeiska esperantister. Mramba och en del av hans projekt presenterades i *La*

Generators



Espero 2012:2, i samband med att *Esperanto Secondary School* invigdes i hans by.

Radiostation en startades för

att utbilda befolkningen i miljöskydd, hälsovård, mänskliga rättigheter, sexuell jämställdhet och kulturella frågor, samt för att sända lokala och internationella nyheter. I planerna ingår också att sända kurser i esperanto.

Budgeten för solenergiprojektet beräknas till 1560 EUR, varav 200 EUR skall finansieras lokalt. Det begärda bidraget är alltså 1360 EUR och projektstarten planeras till mars 2013.

SEF-styrelsen bedömer att ett bidrag av denna storleksordning inte faller inom ramarna för våra förvaltade fonder och överlämnar därför bidragsansökan till dem av våra medlemmar som har möjlighet och finner det angeläget att hjälpa till. Bidragen kan skickas till Mramba Simbas UEA-konto

smba-n (UEA har ett svenskt postgirokonto, 743 74-0, som man kan använda för att föra över pengar utan extra kostnader) eller till bankkonto i Tanzania eller Tyskland. Närmare upplysningar finns i den utförliga ansökan som kan beställas hos mig per telefon 0736-170123 eller e-post sveda@esperanto.se eller annlouiseakerlund@gmail.com.

Jag kan även skicka verksamhetsberättelsen för perioden november 2011 till september 2012.

En framgångssaga

Många i Sverige har kanske redan hört talas om Mramba Simba, men det kan vara bra att

berätta något om honom: en föräldralös pojke som genom Hans Bakkers hjälp fick en handdriven symaskin och senare en cykel någon gång kring 1990. Det var starten på en framgångssaga: han hade ett brinnande intresse för miljöfrågor och började ägna sig åt politik. Med bara 4 års skola, men mångårig korrespondens med esperantister, blev han motsvarande kommunfullmäktiges ordföran-



Lernantinoj legas

de. Han ägnade de första åren till att förbättra möjligheterna till skolgång åt barnen och senare åt att ge alla möjlighet till information genom FM-radiostationen till hela befolkningen. Radion är hans möjlighet att nå ut till människorna i kommunen med lokala meddelanden och info om esperanto, vilket han passar på med när det finns chans. Hans aktiviteter har uppmärksammats av politiker, men det är med esperantisters hjälp han fått kommunens skolor i stånd och en högstadieskola.

Ann-Louise och Anita

Sunpaneloj

Kara Ann-Louise, tre koran dankon pro via bona informo pri la subteno decidita de la estraro de SEF por donaci al mia radio-projekto la sumon de 2,500 SEK, Bonvolu transdoni dankesprimojn al ĉiuj estraranoj.

Mi esperas ke per tio mono ni povus almenaŭ aĉeti unu sunpanelon. Do vi

povus sendi la monon per Western union

Mi esperas ke kiam vi aperigos la artikolon en via gazeto *La Espero* pri mia projekto kaj mia peto. multaj svedoj legos tion kaj espereble venos pliaj mondonacoj.

Do mi bondeziras al vi.

Mramba Simba

La Espero en Indonezio



Firman en Surabaya ricevis ekzemplerojn de La Espero

Nuntempe mi kaj mia edzo multe vojaĝas, kaj kiam ni vojaĝas ni klopodas renkonti lokajn esperantistojn. En januaro ni estis en Indonezio kaj travojaĝis la insulojn Balio kaj Javo. Indonezio estas tre vasta lando, konsistanta el pluraj insuloj kiuj situas amabŭflanke de la ekvatoro. En januaro estas pluvsezono. La vetero estis varmega kaj humida, sed ne ĉiam pluvis.

En Balio, kie ni restis unu



Iyan en Bandung montras kiel surmeti tradician viran kaptukon

semajno, mi ne sukcesis kontaktiĝi kun iu esperantisto kvankam mi trovis unu-du en Facebook.

Tamen, en Surabaya kaj Bandung ni mallonge renkontis du junajn studentojn, kaj en Jakarto ni estis invitita al studsesio en la klubo "Esperiga Suno". La sekretariino de la klubo, Ilia Dewi, vigle instruis grupon da komencantoj kaj la kluba prezidanto Haris gvidis la progresantojn. Kun Ilia mi havis kontakton jam antaŭ nia foriro. Ŝi partoprenis en la ILEI-konferenco kaj la UK en Kopenhago 2011.

Ni vojaĝis per aŭtobuso de Denpasar (Balio) al Surabaya (en Javo) kaj poste al Jogjakarta. Kun la esperantistoj en Jogja (kiu estas la loka maniero nomi la urbon) mi bedaŭrinde havis nur retan kontakton. Post tiuj du grandurboj ni sentis bezonon iri al la marbordo kaj vojaĝis per minibuso laŭ tre mizeraj vojoj al la banloko Pangandaran sur la suda marbordo, tre trankvila loko.

Survoje al Jakarto ni poste haltis en Bandung, granda urbo kun agrabla klimato en la montaro meze de la insulo Javo. Bandung havas bonajn trajnkonektojn kun Jakarto kaj, ĉar estas pli facile atingi la centron de Jakarto per trajno ol per aŭtobuso, ni elektis la trajnon. Estis belega vojaĝo inter montoj kaj valoj.



Diligentaj gelernantoj en Jakarto

En Indonezio ni spertis ke homoj estas afablaj, bonkoraj kaj tre gastamaj. Multaj homoj parolas la anglan kaj estas facile vojaĝitaj (almenaŭ en Javo kaj se oni ne mem stiras). La trafiko estas terura kaj la vojoj malbonaj, sed la homoj estas paciencaj. Ne eblas veturi pli rapide ol 30-40 kilometroj/hore eĉ en ĉefaj vojoj. Ŝajnas ke malmulte da akcidentoj okazas. Ni ankaŭ kun plezuro rimarkis la religian toleremon; moskeoj, preĝejoj kaj temploj flanko ĉe flanko.

La esperantomovado en Indonezio reekfloras nun. La 5-a ĝis la 8-a de aprilo 2012 okazis la unua Indonezia Esperanto-Kongreso en Bogor en Javo. La plej grava celo de la kongreso estas kunigi esperantistojn el la tuta lando por diskuti pri la landa movado kaj krei landan asocion. Ni deziras al ili grandan sukceson.

Ann-Louise Åkerlund

La 49-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET- 49)

Litova Esperanto-Asocio invitas Vin partopreni vicajn ĉiujarajn internaciajn somerajn tradiciajn la 49-ajn Baltiajn Esperanto-Tagojn (BET- 49). BET okazas ekde 1959 ĉiujare laŭvice en Latvio, Estonio, Litovio. Ĉi-jare la BET okazos en orientlitovia urbo regiona centro UTENA, kiu estas fondita en 1261 kaj estas unu el la plej malnovaj loĝlokoj de Litovio.



TEMPO: BET-49 funkcios la 6-an – 14-an de Julio, 2013.

ALIĜ-KONTAKTADRESO: p.k. 167, LT-44287 Kaŭnas, Litovio, Litova Esperanto-Asocio. Poŝtelefonoj de LEA estas +370-687-12219 kaj +370-686-69875. Telefakso estas: +370-37-228616. Retadreso de LEA estas: litova.ea@mail.lt; pjeorovas@takas.ltirenaa@takas.lt.